




UEN



—Gojo de la strataj gazetvendistoj, kiam ili sciis, ke JEN ne plu faros al ili konkurencon.



JEN

Bariso

Bariso malamis la malfeliĉulojn. Lia patrino vane klopodis por montri al li, ke oni, devas neniam moki kaj insulti ilin, ĉar Dio punas la homojn per la samaj malfeliĉoj, kiujn ili mokis. Sed Bariso ne ŝanĝigis en sia pensmaniero kaj ĉiufoje, kiam li renkontis malfeliĉulon, nur malafablajn parolojn havis por diri.

Unufojon Bariso renkontis lamulon kaj ekkriis!

—Jen! por kio taŭgas tiu ĉi kriplito? Ĉu ne estus pli bone, ke oni estus mortiginte lin? Se mi estus cesaro, mi mortigus ĉiun lamulon.

Dio aŭdis Barison kaj tuj faligis lin kaj igis lin lama.

De tiu tempo, Bariso trakuris la stratojn kun kruro el ligno. En tia stato, li vidis alian tagon du mutulojn, kiuj starante sur trotuaro faradis grandajn gestojn, kaj li ekkriis:

—Jen; ĉu ne estas ridinda, ke homoj estas devigataj fari tiajn gestojn por interkomprenigi? Ĉu ne estus pli bone, se oni mortigus ilin tuj, de kiam ili fariĝas mutaj? Se mi estus caro, mi ne permesus la vivon al tiuj sentaŭguloj!

Dio aŭdis Barison kaj tuj igis lin muta.

En tia kondiĉo, Bariso promenis tra la urbo kaj renkontis blindulon, kiu penege palpis la teron per sia bastono kaj marŝis tre malrapide. Bariso pensis ride-detante:



—Kia feliĉo, ke mi ne estas manmankulino!

—Kial?

—Tial, ke hieraŭ Arturo petis mian manon por edziĝo!

—Rigardu, mi petas, tiun viron, kaj diru ĉu li ne estus pli bone enterigita kun tri metroj da tero sur la ostaro. Se mi estus potenculo, certe li jam ne spirus plul!



E. S.

—Kion vi deziras, sinjorino?
—Kunmanĝanton.



— Pro kio similas aeroplano al esperantisto?

— Pro tio, ke ĉiu aeroplano okupas sia lokon en la spaco, kaj baldaŭ, ankaŭ ĉiu esperantisto estos en sia L. K.



—Ĉu vi ne abonis al Opero, por unu monato?
 —Tute ne! Per sama prezo, mi havus gramofonon, kiu daŭros
 almenaŭ la tutan vivon!




—Kian freŝan voĉon, tiu soprano!
 —Trol! Eĉ ŝi mem ŝajnas malvarmuma.



—Belega kaj efika nia kongreso. De la Esperanta vidpunkto,
 ni decidis propagandi kun *fido*.
 —Kaj de la katolika...
 —Daŭri... *esperante*.



—Ni ne malfruiĝu Rozino; ni devas alveni antaŭ la komenco.
 —Kion! Ŝajnus, ke ni volas profiti la tutan prezentadon.



—Se almenaŭ la programo entenus la nomon de sinjoro Chavet!...

Dio aŭdis lian penson, kaj tuj blindigis lin.

En tia situacio, Bariso estis devigata resti ĉe la pordo de sia budo kaj peti almozon de la trairantoj. Unu fojon li aŭdis paroli pri riĉuloj kaj pensis:

—Mi nescias kiel oni permesas la vivon al la riĉuloj. Ili ja estas vere malfeliĉuloj. La konservado de ilia riĉaĵo, estas la solo zorgo kaj priokupo de ilia vivo. Ili ĉion timas, ĉar ĉio — ili kredas — atencas ilian riĉecon. Ili nenion guas el la vivo, ĉar tuta ilia tempo

estas postulata de la administro de la kapitalo. Certe, se mi estus imperiestro, mi mortigus ilin ĉiujn!

Dio aŭdis la penson de Bariso, sed plena de kompato pensis:

—Nul estas senutile puni lin; li estas tute neko-
rektebla.

Kaj tiun ĉi fojon, Dio ne punis plu Barison.



—Kiel vi faras por esti tiel maldika? Mi provis ĉiajn medikamentojn, kaj nenia prosperis al mi!

Tio ĉi estas la lasta numero de JEN. Dank'al sindonemo de niaj artistoj desegnistoj ni povis pliriĉigi la kolekton de esperantistaj gazetoj per artaj folioj, kiujn post cent aŭ ducent jaroj oni trarigardos kun simpatio. Ni bedaŭras, ke ni ne ĉeestos tiam por rekolti la laŭrojn.

Ni konis la esperantistojn, bonaj, sinceraj, fratsentemaj, sindonemaj kaj amindaj; sed ni tute ne sciis, ke ili havas ankoraŭ pli meritan kvaliton, kiu kortuŝas nin: ili estas obeemaj. Ni konsilis ilin per niaj anoncoj: «*Ne abonu la gazeton JEN*», kaj efektive la konsilo estis sekvita de ciuj unusente kaj unuanime. Ni ĝojas.

Bedaŭrinde, —ĉar ĉiam estas esceptoj— kelkaj ne obeis nin, abonis la gazeton, kaj alportis tiom da profito al la kaso de la Administranto sinjoro Farré, ke ĉi tiu, bonega esperantisto, kiu scias te bone, ke Esperanto ne devas esti instrumento per gajno, rifuzas daŭrigi la eldonadon de JEN por ne plu gajni, profiti, kaj eltiri beneficon. Ni nur submetiĝas al tiuj fidelaj sentoj. Kamaradoj *Apa, Lata, Noté, Babel, Gris, Funoy, Adam*, kaj ceteraj, ili gardas sian internacian kraĵonon por alia fojo, ni liberigas el monata devo, ni havos pli da tempo por la propagando, kaj genufleksinte kontraŭ la tuta Esperantistaro, kaj batante nian




bruston ni pente diras: «Ni pekis, ni pekis, ni pekis, sed ni ne pekos plu! Ni ne plu eldonos novan gazeton!»

Tamen... tamen oni ja ne kritikos al ni la publikigon de gazeteto. Nu! Ĝi estos (eble) nur kaj simple la organo de nia strato, kie, krom ni, loĝas kelkaj samideanoj. Ĝi ja nur estos folieto, tute malgranda folieto, kaj ĝi nur aperos ĉiun dumonaton aŭ ĉiun jartrionon, eble ĉiun jarduonon. Tio sufiĉos por ricevi interŝange ĉiujn aperintajn en la mondo esperantistajn gazetojn. Kaj niaj samstratanoj estos tre kontentaj, kaj eble ili eĉ fondos legoklubon ĉe la spicisto de la angulo, kiu jam scias diri bonan tagon kaj liveras esperantajn makaroniojn elpensitajn de li mem, kaj patentitajn, — kompreneble! (1).

Ni povas certigi, ke JEN ne pereas. Ĝi nur malaperas. Eble post kelke da tempo ĝi revenos inter nin laŭ la modo de tiuj steloj, kiuj, vojaĝemaj, sin montras de tempo al tempo al nia vido. Ĝia nova apero, se iam ĝi revenas, ne kontraŭdiros la antaŭdiritan penton, ĉar efektive ĝi ne estos nova gazeto...

Al ĉiuj nian respektan saluton kaj samideanan manpremon.



—Almozon, mi petas! Mi ĵus forlasis la hospitalon!
—Almozon! Kaj fumante! Mi ne povas. Mi apartenas al Sobra Ligo.

(1) Tiu ĉi rekamo estas scopaga.



—Ĉu vi neniam vizitis Barcelonon?

—Kial! Ĉu okaze ĝi iam vizitis min?





—Kia feliĉo, kiam aperos la «Provo de Tualeteja Vortareto»! Oni scios almenaŭ per kio oni sin beligas!



- noé.
..09.
- Kiom ŝuldas Nazulo al vi?
 - Unu spesmilon kaj tri piedbatojn.
 - Kaj vi al li?
 - Du vangofrapojn kaj kelkajn spesojn.

Abonu JEN'N

Ĝi estas abonebla kaj acetebila en neniuj librovendejoj

Ne acetu la kolekton de 12 numeroj de JEN,

kiun oni povas mendi de Sinjoro Ramon Farré, Strato Portaferriça, 17, Barcelono,
per la tre kara prezo 6 frankoj.



Karikaturo de Gavarni
(Litografio de Benjamin)



LA PARIZAJ STUDENTOJ

—Nu, adiaŭ, mia kara... Mi konfidis al vi mian virinon kaj la pipon... Precipe, zorgu la pipon...



EN CLICHY

—Kredu al mi: antaŭpagu nenion. Kreditoro, kiu ne estas pagata, estas simpla kreditoro; sed kreditoro, kiu enspezas iom, estas vera tigro.




—Henriko ja estas bona partio, sed ŝajnas al mi, ke mi pli amas Karolon.

—Edziniĝu al Henriko, do!



La sinjorino.—Jes, ni ĵus alvenis de la Kontinento, kie mia filino elfinis sian edukadon. Ŝi parolas ĉiujn lingvojn.
La profesoro.—Ha? Ĉu ankaŭ Esperanton?
La sinjorino.—Tute kiel enlandano!



NIAJ MODERNAJ SKEPTIKULOJ.—Pardonu, sinjoro: pendas al vi la rubando de la ŝuo.


KOLEKTO DE "JEN"

12 Numeroj afrankitaj 3 frankojn.

12 Numeroj bele binditaj per speciala
fleksebla tolo. 6 frankojn.

Sin turnu por la mendoj al Sinjoro Farré,
- strato Portaferrica, 17, Barcelono - aŭ al liaj
representantoj.

Sinjoro Farré akceptas por la pago Internaciajn
Respondkuponojn, Postmarkojn Francajn Anglajn
Germanajn aŭ Hispanajn, Ĉekojn Kontraŭ la
Ĉekbanko, kaj Francajn Postmandatojn sur kiuj ne
estos skribita la nomo de la enspezonto.



FINO

KRONAS.....

FINON.

